

*

Lingvo Internacia



Duonmonata gazeto

por

Esperanto

eliranta la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato

~~~~~  
*XI-a Jaro*  
~~~~~

PARIS V°
PRESA · ESPERANTISTA SOCIETO
33, Rue Lacépède, 33

ONI ABONAS L. L. ĉe:

a) oficejo de la gazeto en **Paris**, — b) S-ro *P. Ahlberg*, Sekretario de Klubo Esperantista, en **Stockholm**, (Svedlando), Döbelnsgatan 50, — c) S-ro *Manuel Benavente*, Sociedad 14, **Murcia**, (Hispanlando), — d) S-ro *K. Ostanievič*, «Kontoro Esperantista», en **S.-Peterburg** (Ruslando) Jaščik 80, — e) Societo «*Espero*» en **S.-Peterburg** (adr. D-ro *A. I. Asnes*, Bolšaja Podjačeskaja, d. 24. kv. 12.), — f) Firmo *Möller & Börel*, Prinzenstrasse 95, **Berlin S.** (Germanlando), — g) Firmo *J. Lindauer'sche Buchhandlung (Schöpping)*, Kaufingerstrasse 29, **München** (Bavarujo). — Oni sendu abonmonon nur al unu el tiuj ĉi sinjoroj resp. firmoj, aŭ al redakcioj de gazetoj aŭ sekretarioj de grupoj esperantistaj.

Jara abono: sen literatura aldono 5 frankoj, kiun sumon oni sendu laŭeble per poŝta mandato. (Por papermonoj ni kalkulas: 5 frankoj = 2 rubloj = 4 germ. markoj = 4 ŝilingoj = 1 dolaro = 2,50 hol. floreno = 4 skand. kronoj = 5 aŭstro-hungaraj kronoj.) — Kun literatura aldono 7,50 fr.

Prezo de ĉiu numero 40 centimoj.

Pago por anoncoj: 40 centimoj por linio (kompostita el «petit» presliteroj); ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. Malgrandajn nekomercajn anoncojn ni presas por niaj abonantoj po dudek centimoj por linio. Rabato por almenaŭ ses presoj: 10 %.

La ŝanĝo de adreso kostas 50 centimojn.

Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por $\frac{3}{4}$ de ilia valoro.

HELSINGFORS, Finlando, *Martin & Mäkelä*, librejo (adr. : It. Wiertotie 6, Felef, 5434, rekomendas sin al la finlandaj Esperantistoj.

STENOGRAFIO. — S-ro Maurice David, sekretario de la grupo Esperantista en Saint-Claude, deziras trovi monhelpanton por eldonigi lernolibron de Esperanta Stenografio verkita laŭ la metodo Prévost-Delaunay. — Oni volu turni sin al S-ro David, 36, faubourg Marcel, Saint-Claude, (Jura), Francujo.



INTERNACIA SIGNO

aprobita de grupoj kaj societoj en Kanad-, Anglo-, Belg-, Franc-, German-, Hispan-, Aŭstro-, Fin-, Itallando, Siberio k. a. rekomendata de S. F. p. p. E., butontrua, broĉa, kravata, ricevebla ĉe ĉiuj Grupoj Esperantistaj: 1 franko. — Rabato al la grupoj por almenaŭ 12: 20 %. — Sin turni al S-ro

Emile P. GASSE, 105, Lycée, Le Havre, Franclando.

A. S. FEDORĈENKO, studento, *Ruslando*, Kieff, deziras interŝanĝi salutojn kun geesperantistoj ĉiulandaj per ilustritaj estetikaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de urboj, kaj portretoj de societaj eminentuloj kaj geartistoj gloraj. — Responde li sendos artan poŝtkarton.

Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio **PARIS**, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

15 oktobro 1906

Raporto pri la 2-a Universala Kongreso de Esperanto en Genève 553

Nia aldono literatura (paĝoj 305—320) : **La puto kaj la pendolo**, de EDGAR A. POE (trad. ALEX. PRIDE), *daŭrigo kaj fino*, — kaj **La fumo**, de MARYA KONOPNICKA (trad. VLAD. SVIDEREK), *komenco*.

Raporto

pri la 2-a Universala Kongreso de Esperanto en Genève.

(*Daŭrigo kaj fino.*)

Tiu ĉi letero alportanta la Apostolan Benon de la plej alta Estro de la Katolikoj, kaj publike legita de protestanta pastro en la Kongreso, ricevas longan kaj varman aplaŭdadoŝ.

Al ĉiuj ĝi aperas kvazaŭ nova pruvo de la absoluta neŭtraleco de Esperanto en ĉiuj specialaj fakoj religiaj, socialaj aŭ politikaj ; ĝi estos certe ankaŭ potenca helpilo por la propagando ĉe la kátolikoj, kiuj, eble pli ol aliaj, obstine kredas, ke la lingvo internacia povas esti nur la latina.

S-ro Bourlet diras, ke li estas liberpensulo. Kiel liberpensulo li forte altiras la atenton de l'Kongreso al tiu ĉi grava aprobo de l'Papo, kaj insistas, por ke oni penu ricevi tian aprobon de ĉiuj estroj de aliaj religioj aŭ ideaj fakoj. Tio ĉi havos certe gravan rezultaton por la propagando, kaj montros plej evidente la neŭtralecon de Esperanto. (*Aplaŭdado.*)

D-ro Bein diras, ke en la Kongresoj de Esperanto oni nepre devas uzi nur la lingvon internacian. Tial li forte

malaprobas, ke oni kelkafoje parolis nacie en la nuna Kongreso (1).

S-ro Privat donas fine al la kongresanoj kelkajn praktikajn informojn pri la kunvenoj de specialistoj kaj pri la hodiaŭa vesperfestoj.

Dum la posttagmezo okazas ankoraŭ multaj privataj kunvenoj. Jam kunvenis matene, tuj post la labora kunsido, la matematikistoj kunvokitaj de S-ro Bourlet, kaj la advokatoj, sollicitoroj, ktp. kunvokitaj de S-ro Michaux, por fondi specialan esperantistan societeton.

Je la dua kaj duono kunvenas la membroj de la Lingva Komitato, sub prezido de D-ro Zamenhof kaj de S-ro Boirac; je la kvara la medicinistoj, farmaciistoj kaj dentistoj kaj aliparte la stenografistoj kunvokitaj de S-ro Bréon.

Je la kvina okazas samtempe en diversaj ĉambroj: kunvenoj de la oficiroj kunvokitaj de Leŭtenanto Bayol; de la komercistoj sub aŭspicoj de la komerca societo « *Progreso* » de Frankfurt kaj de la franca komerca kaj industria Societo Esperantista; de la sciencistoj kaj sciencamantoj sub prezido de generalo Sébert; fine de la francaj edukistoj kunvokitaj de S-ro Boirac.

Je la kvina kaj duono kunvenas la katolikoj kunvokitaj de pastro Peltier, kaj je la sesa la framasonoj en la framasona klubejo de la strato Bovy-Lysberg, kie okazas privata festeno

(1) Verŝajne S-ro Bein ne celis en sia kritiko la uzon de la franca lingvo en la solena malferma kunsido de la Kongreso, en kiu estis multaj Genevanoj ne-esperantistaj, tre feliĉaj aŭdi france kelkajn praktikajn informojn pri Esperanto krom la specimenoj de nia lingvo, kiujn ili ne povis kompreni, sed kiuj montris al ili la facilan uzeblecon de Esperanto.

Lia kritiko koncernas kredeble nur la uzon de nacia lingvo en kunsidoj speciale Esperantistaj, ekzemple la italan toaŝton dum la festeno en Vevey aŭ la francan « kanzonon » en la unua vesperfestoj. Pri tio ĉi li estas certe tute prava. Mi ja legis en la Geneva gazeto *La Suisse* artikolon pri la dirita vesperfestoj, en kiu la aŭtoro mokas nin, dirante proksimume tion ĉi: « Ni rimarkis ofte la krion *Bravo!* kio montras klare, ke tiu ĉi vorto estas ankaŭ esperanta, aŭ eble, ke la kongresanoj scias la francan lingvon. Cetere la plej granda sukceso estis nedisputebla por franca kanteto, kiu vere ŝajnis perfekte komprenata de ĉiuj. Tre kredinde estas, ke la Esperantistoj estas homoj, kiuj scias la francan lingvon, kaj nur mistifikas nin per ilia Esperanto. »

kaj poste solena akcepto farata de la Genevaj loĝioj, kun francaj kaj esperantaj paroladoj pri Esperantismo.

La kongresanoj kiuj ne partoprenas en kunvenoj vizitas individue, laŭ la programo, la muzeon Ariana en bela kastelo, meze de vasta parko, sur la bordo de l' lago.

Aliaj profitas la liberan posttagmezon por detale viziti la kongresan ekspozicion. En ĝi ili trovas, kiel la pasintan jaron en Boulogne, multajn dokumentojn montrantajn la pli kaj pli grandan disvastiĝon de Esperanto. Mi povas citi ĉi tie nur la ĉefajn inter ili.

Dekstre, apud la pordo, jen estas unue skribmaŝino *Yost*, kiu diras sin « la plej bona el la skribmaŝinoj ». Oficisto de la firmo *Yost* ĉeestas la tutan tagon en la ekspozicio por montri al la vizitantoj la funkciadon de la maŝino. Bedaŭrinde li ne scias Esperanton, kaj li eksperimente konvinkigaŝ, ke la scio de nia lingvo estos baldaŭ nepre necesega por ĉiuj komercistoj. La maŝino, kiun li montras, estas la ordinara tipo *Yost*, per kiu oni jam nun povas, sen speciala aranĝo, skribi Esperanton, sed kiu estas nekapabla supersigni la grandajn literojn, kaj devas anstataŭi la literon ŭ per la litero ù. La oficisto anoncas, ke baldaŭ la firmo *Yost* aranĝos specialan tipon de maŝino kapablan skribi Esperanton tute plene kaj korekte, kaj plie eldonos esperantan katalogon pri siaj skribmaŝinoj.

Tion ĉi jam faris la firmo *Oliver*, kaj dum la unuaj tagoj de la ekspozicio oni povis vidi tipon de ĝiaj skribmaŝinoj kapablaj skribi, krom la lingvoj franca, germana kaj angla, ankaŭ Esperanton tute korekte, kun la speciala litero ŭ, kaj ĉiuj supersignitaj literoj grandaj aŭ malgrandaj. Plie, esperanta katalogo kun multaj ilustraĵoj estas lukse eldonita de la firmo *Oliver*, kaj klarigas detale la mekanismon kaj funkciadon de la maŝino. Ĝi estos senpage sendata al ĉiuj Esperantistoj, kiuj ĝin petos, skribante al : *Oliver Typewriter Company. Ld., 75, Queen Victoria Street, London.* Tiu ĉi katalogo formas, kun la jam aperintaj esperantaj katalogoj de la gravaj firmoj *Gaumont* (Fotografiloj : 57, rue Saint-Roch, Paris) kaj *Stephens* (Inkoj : 57, Aldersgate Street, London), ŝatindan dokumentaron, kiun devas posedi ĉiuj propagandistoj kaj paroladistoj de Espe-

ranto, por montri, kiel Esperanto nun disvatiĝas ĉe la komercistoj (1).

La legantoj certe pardonos min pri mia insistado pri la esperantaj skribmaŝinoj: ili ja facile komprenos, kiel evidente montras niajn progresojn ĉe la komercistaro tiu ĉi alfarado al Esperanto de la diversaj sistemoj de skribmaŝinoj kaj la ĉeesto de du el ili en la kongresa ekspozicio.

Apud la skribmaŝino *Yost* estas videblaj la diversaj « Ĉefeĉaĵoj », nome la famekonataj « ŝlosiloj », diversaj tipoj de esperantaj signoj, en kiuj la stelo estas ĉirkaŭata de rondo, kies koloro montras la naciecon de l'portanto, kaj ankaŭ tre praktika tipo de la simpla stelo por butontruo.

Apude troviĝas la diversaj eldonaĵoj de la Brita Asocio, kaj iom pli malproksime la « Sekfumitaj Haringoj » de S-ro Duchochois en Boulogne-sur-Mer. Oni vidas poste novan ludon: « *Punta*, la universala tutmonda ludo en la universala tutmonda lingvo ». Ĝi estas « kombino de ĵetostoj kaj kartoĵoj unuparte, kaj kombino de koloroj kaj nombroj aliparte » diras la esperanta regulo de l'ludo eldonita de Punta-Haus en Bern (Svisujo).

Apud agrablaĵo troviĝas utilaĵo, jen estas ja la « Botpoluro Esperanto » speciala ciro por ŝuoj. La pipoj « Esperanto » estas trankvilaj najbaroj de la likvoro « Espérantine », kiu sciigas nin per bela esperanta prospekto, ke ĝi naskiĝis dum la XIII^a jarcento — kaj ne dum la Boulogne'a Kongreso, kiel oni povus kredi — kiel atestas historiaj skribaĵoj de Philippe

(1) Mi devas tie ĉi rememorigi, ke la maŝino *Oliver* ne estas la unua skribmaŝino speciale aranĝita por skribi ankaŭ Esperanton, krom diversaj naciaj lingvoj. Jam de longe la skribmaŝino *Hammond* (9, rue Le Peletier, Paris) posedas tiun ĉi kapablon per simpla ŝanĝo tre rapide farebla de peceto en la maŝino. Ĝi eĉ liveras pli oportune pli belan skribaĵon ol la *Oliver*, ĉar ĝi skribas la supersignitajn literojn per unu sola frapo de klavo, kaj ne supersignas la malgrandajn literojn iom tro alte super la skriblinio, kiel faras la *Oliver*, kiu samalte supersignas la grandajn kaj la malgrandajn literojn.

Cetere multaj skribmaŝinoj povas skribi Esperanton sen speciala aranĝo, kiel nun faras la *Yost*, la *Remington*, t.e. ne supersignante la grandajn literojn, kaj uzante la literon *ù* anstataŭ *ü*. Inter ili mi povas citi tute aparte la maŝinon *Dactyle*, pro ĝia malalta prezo.

de Commines : « ...*et moult feist de bruit l'eau d'arquebusade Espérantine.* » (1). Se vi volas konstati mem, ke mi ne ŝercas, petu la prospekton de S-ro Brunon-Chauvet en Saint-Etienne (Francujo).

Cu la Esperantistoj estas drinkemuloj? Mi ne scias; sed certe la vinistoj estas « esperantistiĝemuloj ». Estas ja videblaj apud la likvoro *Espérantine* la esperanta vino « *Mirinda* » de S-ro Jadeau en Mercurey (Saône-et-Loire), la grandaj vinoj de S-ro Moreau-Voillot en Beaune (Côte-d'Or), la grandaj kaj ordinaraj vinoj rikoltitaj de D-ro Vesoux en la sama lando, la ĉampanvino Ay Saumanta « Esperanto », kies sola agento estas S-ro Roels-de Rop, rue du Transvaal, 64², en Antverpeno (Belgujo). Ĉiuj tiuj ĉi vinvendistoj presigis esperantajn prospektojn, kiujn povas libere preni la vizitantoj. Apud la vinoj, jen ankoraŭ boteloj da « Olivoleo Esperanto » de S-ro Lanisson en Salon (Provence).

Ne malproksime de la « botelaro » estas la Bohema ekspozicio kun diversaj lernolibroj kaj esperantaj verkoj eldonitaj de niaj Bohemaj samideanoj.

Sur apuda tablo troviĝas kelkaj ekzempleroj de la ĵus aperinta « *Klariga Libreto de l'Delmas'aj Helpaj Bildoj* por la praktika instruado de l'modernaj lingvoj per la senpera metodo kaj bildaro ». Tiu ĉi libreto, france kaj germane verkita de S-ro E. Rochelle, profesoro en la liceo de Bordeaux estas tradukita kaj alĝustigita al Esperanto de S-ro de Beaufront. Ĝi enhavas detalajn klarigojn kaj priskribojn pri serio da 16 specialaj grandaj (90 x 120) koloraj murbildoj, kaj liveras al la profesoroj kaj lernantoj ricegan materialon por konversacio pri ĉiuspecaj ordinaraj aferoj de la ĉiutaga vivo. En ĝi estas troveblaj multego da nomoj de plej diversaj objektoj, profesioj, ludoj, manĝaĵoj, ktp., kiujn oni vane serĉus en niaj plej plenaj vortlibroj, kaj kiuj forigas grandan ĝisnunan mankon en nia lingvo. La 16 bildoj estas nigre represitaj en du kajeroj de oportuna formato, kiujn povos kunporti hejmen la lernantoj de la kursoj, en kiuj oni uzos la grandajn kolorajn murbildojn.

Kun ĉiu bildo estas sentraduka vortaro de la nomoj de ĉiuj

(1) « ...Kaj grandan bruon faris la saniga likvoro *Espérantine.* »

objektoj sur ĝi, kaj antaŭ ĉiu vorto numero respondanta saman numeron presitan apud la koncernata objekto.

La eldonisto (S-ro G. Delmas, 10, rue Saint-Christoly, Bordeaux), presigis esperantajn cirkulerojn, en kiuj li proponas sendi senpage al la petontoj unu specimenon de l'kunportebaj bildoj akompanatan de ĝia vortaro en la lingvo, kiun oni deziras (angla, franca, germana, hispana, itala, rusa, flandra aŭ Esperanto).

Jen estas nun Esperantaj libroj punktrelefe presitaj por blinduloj. Ilia dikeco altiras la atenton de la vizitantoj, kiuj rigardas ankaŭ kun intereso la skribilon uzatan por skribi per reliefaj punktoj la Braille-literojn. Sur la sama tablo troviĝas la diversaj eldonaĵoj vendataj por la profito de la propagando de Esperanto ĉe la blinduloj: « *Trafendita Turo* », « *Une heure d'Espéranto* » la amuza dialoga parolado de S-ro Cart pri Esperanto, « *Notions élémentaires et exercices de Conversation* » de la same aŭtoro ktp.

La apuda ekspozicio de la *Presa Societo* montras la jam multajn librojn eldonitajn de tiu ĉi firmo speciale Esperantista. Sur la muro estas rimarkindaj grandaj murbildoj prezentantaj la scenojn rakontitajn en la ses ekzercoj de la « *Premières Notions* » kaj uzataj de la aŭtoro por publika instruado per tiu ĉi libro (1). Aliaj grandaj koloraj murbildoj plenumas saman oficon por helpi al la instruado per la libreto « *Instruado de Esperanto per Bildaro* ».

Sur najbara tablo vidiĝas la diversaj gazetoj kaj libroj esperantistaj kun ankaŭ esperantaj muzikaĵoj, inter kiuj oni rimarkas « *La Vojo* » de S-ro Deshays, « *La Espero* » de S-ro de Ménil, la de nun kvazaŭ oficialan himnon de la Esperantistoj, kaj la novnaskitan « *Marŝo de la Esperantistoj* » de S-ro Deshays. Sur la sama loko estas ankaŭ videbla bela esperanta poŝhorloĝo, sur kies postflanko brilas la kvinpinta stelo kaj tiu ĉi frazo reliefe skribita: « Per Esperanto al amikeco inter ĉiuj popoloj ». Ĝi estas fabrikita de S-ro Ph. Wolf

(1) Oni trovos kopiojn de tiuj ĉi bildoj en la dua eldono de la « *Notions* » kaj ankaŭ en libro ĵus aperinta ĉe la Presa Societo: « *Cours Complet d'Espéranto* » enhavanta la tutan materialon de la du libroj *Premières Notions* kaj *Instruado de Esperanto per Bildaro*, kun plena leksikono de la uzitaj vortoj.

en La Chaux-de-Fonds (Suisse) kaj estas vere ĉarma memoraĵo pri la Kongreso.

Sinjoro Caudevelle, la Boulogne-a « Kongresa fotografo » montras apude portreton de D-ro Zamenhof, kiu estas certe, laŭ mia opinio, el ĉiuj la plej bela kaj « vera » portreto de nia majstro. En lia ekspozicio estas ankaŭ rimarkata serio da poŝtkartoj ilustritaj pri la unua Kongreso.

Sur aliaj tabloj, meze de la ĉambro, jen estas germanaj eldonaĵoj kaj prospektoj por Esperanto, granda amaso da cirkuleroj, katalogoj kaj sorb-paperoj de la firmo *Stefens*, kolektoj da ĵurnalaj artikoloj pri Esperanto, longa tolaĵa banderolo tute kovrita per esperantaj diverslandaj korespondaĵoj: ĝi foriris el Clermont-Ferrand, kaj rondiris ĉirkaŭ la tuta terglobo, de korespondanto al korespondanto, antaŭ ol reveni al la loko de naskiĝo.

Sur la muroj oni vidas interesajn paĝojn de la kongresa numero de la *Tra la Mondo* kaj diversajn afiŝojn, inter kiuj estas aparte rimarkindaj la « *Matkaraj Afiŝoj internaciaj por Propagando* » aĉeteblaj ĉe la Grupo de Versailles, kaj ankaŭ la blanka oficiala afiŝo anoncinta la kurson de Esperanto en tiu ĉi sama urbo.

Fine, oni trovas ankaŭ en la kongresa ekspozicio Esperantajn « artaĵojn », jes, tri artaĵojn: portreton oleopentritan de D-ro Zamenhof, statuon nomitan « Esperantistino », kaj statueton prezentantan Esperanton ekflugantan super la mondo. Pri la ambaŭ unuaj, mi nenion diras, por ne ĉagrenigi la aŭtorojn; la tria estas vere ĉarma verko, cetere subskribita de S-ro Ernest Legrand, Rom-premiulo.

El la multaj dokumentoj montritaj en tiu ĉi ekspozicio, kiujn mi volus citi pli detale, eliras tiu ĉi konkludo nedubebla, ke, de unu jaro, nia lingvo tre progresis en la mondo, precipe ĉe la komercistoj, kaj ke, aliparte, tre perfektigis la rimedoj por ĝia instruado kaj propagando. Eĉ la ekspozicio mem tre helpis certe en Genève por la propagando, ĉar ĝin vizitis multaj ne-esperantistaj Genevanoj dum la tuta kongresa semajno.

*

* *

Je la oka kaj duono vespere, en la teatra ĉambro de la « Amikoj de l'Instruado », dua teatra festo, kaj balo kun naciaj kostumoj.

Ĉar bedaŭrinde la ĉambro ne estas sufiĉe vasta por enteni ĉiujn kongresanojn, ĉeestas nur la *verdkartuloj*, dum la aliaj aŭskultas en la « Aula » de l'Universitato, kun multenombra Geneva publiko, la paroladon de S-ro Michaux, pri kiu mi jam parolis.

Dum la unua parto ni aŭdas, kiel en la unua vespèrfesto, multajn kaj longajn muzikaĵojn: S-ro Hanauer (germano) kantas la *Adiaŭan Kanton de Votano*, el la Valkirio; F-ino Farnes (anglino) « *Apud mia fenestro* »; S-ino Guivy kaj F-ino Perrin (francinoj) « *Aŭtuno* »; F-ino Schafer (anglino) « *La Espero* » kaj « *Svisa Paŝtista Kanto* », ktp., ktp.

Inter kantoj S-ro Pujula y Vallès (katalano), kaj F-ino Schafer (anglino) aŭdigas al ni feliĉe iom da komprenebla senkanta Esperanto. S-ro Pujula deklamas du amuzajn monologojn, kiujn li verkis mem: *La Pipamanto* kaj *La Senhejmulo*. En la unua li rakontas kun vere admirinda « vereco » la malagrablajn aventurojn al li kaŭzitaĵojn de lia senmodera pipamo. Kvankam li ne parolas tre laŭte, tamen ne eĉ unu vorto perdiĝas, tiel klare li prononcas. Li estas multfoje interrompata de gajegaj ridoj kaj de varmaj aplaŭdegoj de la tuta aŭdantaro.

En *La Senhejmulo* li restas ankoraŭ tiel perfekte « vera » kiel en *La Pipamanto*, sed pro tiu ĉi perfekteco mem en la vereco, li fariĝas bedaŭrinde malpli ŝatinda en la vidpunkto pure esperantista. La senhejmulo estas ja ebriulo, kiu ame parolas al sia kara botelo, kaj ĉiu scias, ke la ebriuloj ne kutimas paroli plej klare. Tial, pro lia perfekta ebrieco mem, S-ro Pujula ankaŭ prononcas iom malklare, kaj mi devas konfesi, ke kelkaj frazoj tute perdiĝas por mi. Certe ne venis ankoraŭ taŭga epoko por ŝerce difekti la prononcon de la lingvo, kaj dum ankoraŭ kelke da tempo plene sufiĉos, ke kelkaj Esperantistoj ĝin difektas senvole.

F-ino Schafer deklamas « *La Malsana Junulo* » en vere esprimplena maniero kaj kun tre bona kaj klara prononco. Si estas forte aplaŭdata, kaj ricevas merititan sukceson.

Post ĉiuj kantoj kaj deklamoj estas fine ludata unuakta komedieto: « *Agrabla Surprizo* », tradukita de S-ro Zacherl,

kiu plenumas mem la ĉefan rolon. Fraŭlinoj Stirn, A. Schmidheini kaj E. Schmidheini ludas la aliajn rolojn kun plej laŭdinda konscienco.

Je la deka kaj duono finiĝas la teatra festo ; oni forprenas la benkojn ; la orkestro Alessandro instaligĝas sur la scenejo, kaj en la nun libera loko komenciĝas la balo. Unu fojon plie oni bedaŭras la malvastecon de la ĉambro, kaj, por lasi al la dancantoj kiel eble plej liberan lokon, la ne-dancantoj surpriras sur superan galerion, de kie ili povas ĝui la spektaklon de la dancado kaj admiri la belajn naciajn kostumojn de la dancantoj. Inter ili unu el la plej belaj kaj riĉaj estas tiu de Rusino, kiu portas en korbo divenu kian naciaĵon... bombojn ! kiujn ŝi de tempo al tempo ĵetas, sed kiuj feliĉe estas saĝaj pacemaj bomboj esperantistaj, kaj detenas sin de bedaŭrinda eksplodo en tia ĝojega balo de samideanoj. Alia kostumo tre rimarkata estas tiu de S-ro Mohammed Sher Khan el Randhapur, kiu reprezentas en la Kongreso niajn Hindajn amikojn.

Mi rimarkas kelkajn kostumojn de Svisoj kaj de Svisinoj vestitaj laŭ la maniero de la diversaj Svisaj kantonoj.

Jen estas ankaŭ diversnaciaj oficiroj kun siaj naciaj uniformoj : kolonelo Pollen (anglo), sub-kolonelo Ayza (hispano), majoro Lemaire (belgo), kaj leŭtenanto Bayol (franco).

Blankbarba respektinda bedueno altiras mian atenton ; mi alproksimiĝas por lin intervjui kaj informiĝi pri lia lando kaj nomo, sed bedaŭrinde mi tiam sciigĝas, ke antaŭ mi staras nur falsa bedueno !... Mi parolas nur al falsvestita germano, ne pli bedueno ol vi aŭ mi ! Tio ĉi min ĉagrenas, ĉar jam la pasintan jaron mi rimarkis en la kongresa balo ankoraŭ pli fantazian kostumon de juna anglino kun kasko, ŝildo... kaj eĉ tripinta forkego !! Mi revidas ŝin hodiaŭ ankoraŭ fantazie vestitan kiel marist...iĉo... La ideo de balo kun *naciaj* kostumoj estas certe bonega kaj tre taŭga por montri al la neesperantista publiko la diversnaciecon de la kongresanoj ; sed se la fantaziaj kostumoj ne estos en tia balo severe malpermesitaj, tiu ĉi bonega rimedo de propagando turniĝos kontraŭe en tiel same bonegan rimedon por igi nin mokindaj, kaj doni al la publiko tiun opinion, ke ni estas nur mistifikuloj. Se ja eĉ unu fantazia kostumo estas vidata en la balo, niaj kontraŭuloj plej facile konkludos — kiel kelkaj jam faris pri la Boulogne'a balo — ke la pretendita « balo kun naciaj kostumoj »

estas nur ŝercaĵo, kaj simple balo kun falsvestaĵoj, per kiu la Esperantistoj celas nur trompi la publikon. Oni ofte ripetis tre prave, ke ni devas ĉiam esti plej seriozaj en nia propagando; tiu ĉi ĝustega diro restas ĉiam plej atentinda, eĉ en kongresaj baloj.

Meze de l'balo eniras D-ro Zamenhof kun Boulogne'a sinjorino vestita kiel la kamparaninoj en la lando de la unua Kongreso. Ruĝa rubando brilas ĉe la butontruo de nia Majstro, kiu hodiaŭ la unuan fojon elmontras sian gloran ordensignon. Mi ne vidas lin danci, sed lia frato kontraŭe dancadas tiel fervore, ke al mi nevole venas penso pri la ŝanĝemo de l'sorto, kiu, antaŭ kelkaj monatoj, kondukis tiun ĉi afablan viron tra la Maĉĉurujaj bataalkampoj, kaj hodiaŭ feliĉe en la balon de nia Kongreso.

Inter du dancoj Skotano, kun genuoj nudaj sub la nacia jupeto, supreniras la estradon de la muzikistoj, kaj kantas « *Mia Esperantistino* » tiel kore, tiel klare, kun tiel ĝoja mieno, ke li ricevas veran ovacion, kaj ke — oni diriĝ al mi — la morgaŭan tagon ĉiuj ekzempleroj de lia kantaĵo en la ekspozicio kvazaŭ sorĉe elvendiĝis.

Post lia kanto denove komenciĝas la dancoj, denove la danctaroj turniĝas kaj turniĝas en la dolĉa harmonio de l'muziko, senlace, sensate, ĝis malfruega horo en la mateno...

*

* *

Sabaton, 1-an de Septembro. Je la naŭa kaj duono matene en la ĉambro « *Aula* » en la Universitato, tria labora kunsido.

La kunsido malfermiĝas je la deka kaj kvarono.

S-ro Chavet, sekretario, legas la protokolon de la antaŭa kunsido. Pri ĝi oni faras kelkajn rimarkojn :

S-ro Capé (franco) diras, ke li parolis pri nomo internacia por la konsulejoj, kaj ne pri nomo nacia, kiel oni raportis en la protokolo.

S-ro Bein (polo) diras, ke li malaprobis la uzon de nacia lingvo ne nur en la malferma kunsido sed en ĉiuj kunvenoj de l'Kongreso.

S-ro Mudie (anglo) atentigas, ke oni forgesis diri en la protokolo, ke la propono pri kreo de konsulejoj estas unuanime aprobita de la Kongreso.

D-ro Rapine (franco) diras, ke oni devas noti en la protokolo, ke *kiel liberpensulo* S-ro Bourlet aprobis la leteron de l'Papo, ĉar tio estas tre grava.

Post tiuj ĉi kelkaj rimarkoj, oni elektas S-ron Kühnl kiel plua sekretario de l'Kongreso; S-ro Privat legas leterojn kaj telegramojn ankoraŭ ricevitaĵojn, kaj inviton faritan de la Oficistoj kaj Laboristoj al la anglaj samideanoj; li donas poste kelkajn informojn pri la hodiaŭaj specialaj kunvenoj.

Poste, laŭ la programo, la prezidanto donas la parolon al S-ro Boirac, prezidanto de la Lingva Komitato, por ke li raportu pri la organizo kaj laboroj de tiu ĉi komitato.

S-ro Boirac starigas kaj rememorigas unue, ke la Boulogne'a Kongreso esprimis unuanime la deziron, ke estu fondata Lingva Komitato; kaj ke D-ro Zamenhof mem elektis la membrojn de tiu ĉi komitato kun la helpo de la kongreso. De tiam, li diras, unu jaro pasis, kaj la membroj de la Komitato nur ĵus kunvenis kaj interkonatiĝis.

La unua tasko de la Prezidanto estis serĉi la nomojn ne sufiĉe precizajn de la komitatanoj. Tio ĉi estis longa laboro, sed nun estas fine starigita plena nomaro kun adresoj kaj notoj pri la speciala kompetenteco de ĉiu el la membroj.

Inter ili du bedaŭrinde jam mortis: S-roj Achille Motteau kaj Haldor Midthus. Kelkaj ne akceptis la proponitan oficon. S-ro Abesgus ne loĝas plu en Persujo, kaj cetere estas Ruso. S-ro Lemaire diris, ke li ne povas esti komitatano, kaj deziras forresti. La raportanto esprimas la esperon, ke li ne persistos en sia decido.

La komitato ricevis multajn demandojn el ĉiuj flankoj. La nomaro de ĉiuj demandoj kaj proponoj estas sendita al la Komitatanoj. S-ro Kabanov sendis rimarkojn pri la danĝero por Esperanto disfali en diversajn dialektojn kaj pri la rimedoj uzotaj kontraŭ tia disfalo; S-ro Rousseau pri la proponita teknika sufikso *-izi*; S-ro Matton pri dek ses diversaj demandoj, kiuj estas nun en manoj de la raportantoj; S-ro Otto Simon pri pronomoj; S-ro Avilov pri la sufiksoj *ĉfo* kaj *njo*; S-ro Sentis pri la prepozicio *de* kaj proponata de li prepozicio *di*. Aliaj proponoj aŭ rimarkoj estas faritaj pri du sencoj de la

komitaton, se li volas, aŭ konservi definitive la ĝisnunan : ĝia prezidanto petas do respektplene la Majstron reakcepti la povojn, kiujn li donis al la Lingva Komitato en la Boulogne'a Kongreso.

Post tiu ĉi tre interesa kaj tre aplaŭdita raporto ne legita, sed parolita en la klarega maniero, kiu karakterizas S-ron Boirac, D-ro Zamenhof stariĝas, kaj esprimas la deziron, ke la ĝisnuna Komitato estu definitiva. La Komitato faros mem en si la necesajn ŝanĝojn per interkonsiliĝo inter siaj membroj, ĉar tio ĉi estas la plej bona maniero por eviti malkontentiĝojn.

La Majstro plie deziras, ke ne nur la nunaj membroj restu en la Komitato, sed ke ankaŭ S-ro Boirac restu prezidanto.

Brua aplaŭdado montras, ke la decido de la majstro ankaŭ plenumis la deziron de ĉiuj kongresanoj.

S-ro Boirac, je la nomo de la Lingva Komitato, tutkore dankas D-ron Zamenhof por lia granda atesto de konfido al la Komitato, li dankas ankaŭ por la honoro al li farita kaj fine petas permeson silentiĝi, ĉar li longe parolis, kaj oni povas vidi sur lia velkinta vizaĝo, ke li estas tre laca. (*Longa aplaŭdado*).

S-ro Schneeberger, prezidanto, diras tiam, ke la aplaŭdoj montras, ke la kongresanoj tute aprobas la mirinde klaran raporton de S-ro Boirac, kaj li proponas ke oni leviĝu je la honoro de la ambaŭ mortintaj komitatanoj (*Ĉiuj kongresanoj leviĝas*).

S-ro Bourlet (franco) diras, ke la Lingva Komitato devus ne konservi la nelaborantajn membrojn ; ili estas en la komitato, kiel li, mem, senutila balasto, kiun oni devus elĵeti. Li do proponas elstrecki post du jaroj la membrojn, kiuj ne laboris dum tiu tempo.

S-ro Cart nalaprobas tiun ĉi proponon, ĉar membro, kiu nenion faris dum du jaroj, povos esti tre utila la trian jaron. S-ro Bourlet mem estos tre utila al la Komitato por doni konsilojn pri la matematikaj vortoj, kiam oni traktos tiun ĉi temon.

S-ro Boirac diras, ke la komitato mem diskutos tiun ĉi demandon.

S-ro Schneeberger rimarkigas ankaŭ, ke tio ĉi estas interna afero de l'Komitato.

S-ro Kuchler (germano) proponas, ke la Komitato reelektu siajn membrojn periode.

S-ro Boirac respondas, ke la Komitato povos diskuti tion mem.

S-ro Bein (polo) demandas, ĉu li havas rajton diri kelkajn vortojn pri la rezultatoj de la laboroj de la Komitato. Post permeso, li diras, ke tiuj ĉi rezultatoj estas vere ĝojigaj. Oni eraris, kredante, ke tia granda komitato ne povos labori. Ĝi jam faris bonegan laboron, ĉar oni korektis preskaŭ unuanime la francajn erarojn. Cetere ĝi restas nur helpanta komitato, kaj la lasta decido ĉiam apartenas al D-ro Zaemnhof.

S-ro Lambert (anglo) demandas, ĉu la celo de la Lingva Komitato ne estas, ke iom post iom ĝi direktu sian penadon al eldono de internaciaj vortaroj.

Majoro Lemaire (belga) petas la parolon por diri kelkajn vortojn. Li dankas la malavaran amikon, kiu donas la necesan monon al la *Centra Oficejo*. Bedaŭrinde, li diras, mi ne povas diri lian nomon, ĉar lia maldekstra mano ne scias, kion donas la dekstra. (*Aplaŭdoj.*)

S-ro Cart poste legas kelkajn fragmentojn el raporto pri Esperanto ĉe la blinduloj, en kiu li studas interalie rimedojn por varbi blindajn adeptojn, kaj por kolekti la necesan monon por plifaciligi al blinduloj la venon en la trian kongreson. Cetere, li diras, por tio la koro certe trovos rimedojn...

Li legas poste leteron de sveda blindulo adresitan al la kongreso.

S-ro Mudie (anglo) proponas, ke F-ino Zabilon d'Her kolektu monon ĉe la pordo por la blinduloj, kiam la kongresanoj eliros el la ĉambro. (*Aplaŭdoj.*)

S-ro Bein (polo) esprimas la deziron, ke ĉiuj neblindaj Esperantistoj skribu tiel bone Esperanton kiel la blinda frato.

Leŭtenanto Bayol (franco) legas poste la tekston de la deziro esprimita de la Ruĝ-Kruculoj en ilia privata kunveno, ke Esperanto estu konata de kiel eble plej multe da personoj, kiuj disdonos aŭ ricevos flegojn de la societoj de la Ruĝa Kruco, kaj ke la Anglaj samideanoj penu por ke la internacia konferenco de la Ruĝa-Kruco, kiu okazos en London en 1907, enmetu en sian programon la demandon pri la alprenado de Esperanto por la servadoj de tiu ĉi Societo.

S-ro Bicknell (italujano) proponas je la nomo de P^o Luigi Giambene, de kiu li ricevis leteron el Romo, ke la Kongreso

esprimu dankon al la neesperantaj gazetoj kiel *Daily News*, *Review of Reviews*, kiuj helpis al la esperanta propagando. (*Aplaŭdado.*)

Oni aŭdas poste svisan blindulon, kiu dankas la kongreson en la nomo de la blinduloj.

S-ro Moch legas karton de S-ro Ellis pri la ĵusa fondo de societo de leĝistoj ; li petas, ke la diversaj specialistoj, kiuj havis privatajn kunvenojn, bonvolu sendi en la sekretariejon protokoleon pri siaj kunvenoj. Restas ankoraŭ sep diversaj proponoj diskutotaj ; li proponas, ke oni interrompu la diskutadon, kaj parolu posttagmeze pri tiuj ĉi proponoj.

Generalo Sébert anoncas, ke en la privata kunveno de la sciencistoj fondiĝis Societo de sciencaj Esperantistoj, kies provizora sekretario estas S-ro Bourlet.

Fine S-ro Privat legas kelkajn leterojn de pentristaj laboristoj, de samideanoj en Centrameriko, ktp. Li montras la ĵus aperintan esperantan gvidlibreton « *Tra Oberlanda Svislando* », kiu estos tre utila por tiuj el la kongresanoj, kiuj partoprenos en la ekskurso post la Kongreso ; li donas informojn pri la kunvenoj de la diversreligiaj pastroj, de la Britaj Esperantistoj, de la « Ruĝuloj », de la Ruslandaj Esperantistoj, ktp., kiuj okazos dum la posttagmezo kaj pri la morgaŭaj diservoj por protestantoj kaj por katolikoj ; li fine proponas, ke oni danku la Genevajn gazetojn, kaj aparte « *La Tribune de Genève* » kaj « *Le Journal de Genève* », kiuj enpresis ĉiutage tre detalajn kaj simpatiajn raportojn pri la kunsidoj kaj festoj de la Kongreso. (*Aplaŭdoj.*)

La kunsido finiĝas je la dekdua.

*

* *

Je la tria posttagmeze, en la sama loko, ferma kunsido oficiala de la Kongreso.

La kunsido estas malfermata je la tria kaj tri kvaronoj.

Post legado de l'protokolo de la matena kunsido, S-ro Mu-die rimarkigas, ke en tiu ĉi protokolo oni forgesis diri, ke pri la gazetoj *Daily News*, *Review of Reviews* S-ro Bicknell parolis en nomo de P^o Luigi Giambene. Li plie sciigas, ke F-ino Zabilon d'Her ricevis hodiaŭ matene ĉe la pordo de la kongresa ĉambro tricent frankojn por la blinduloj. (*Aplaŭdoj.*)

S-ro Moch stariĝas, kaj diras, ke estas proponataj la sekvantaj personoj por esti membroj de la Internacia Organiza Komitato de la tria Kongreso : Generalo Sébert, S-roj Michaux, Schneeberger, Mybs, Hanauer, Mudie kaj Moch kiel sekretario.

Flanke de tiu ĉi internacia komitato ekzistus kompreneble loka organiza komitato en Anglujo.

S-ro Mudie (Anglo) rimarkigas, ke estus preferinde elekti anglan sekretarion, ĉar S-ro Moch perdigus tempon.

S-ro Boirac (franco) diras, ke oni jam elektis konstantan oficistaron. Tute malprave oni do proponis nomaron antaŭ momento. La ĝenerala sekretario de la venonta kongreso ne estas ankoraŭ elektita. Li estos anglo. La tasko de S-ro Moch estos observi kaj kontroli la presadon de la dokumentoj pri la nuna Kongreso.

S-ro Capé (franco) legas komunikajon pri labora metodo, kiun li proponas por la kongresoj. La Kongresanoj venas, li diras, precipe por labori, kaj ne nur por vojaĝi malkare. Tion ĉi oni povis hodiaŭ konstati el la granda nombro da ĉeestantoj en la matena kunsido, kvankam hieraŭ vespere estis balo.

Li petas, ke oni povu voĉdoni denove pri la jam deciditaj demandoj (*Protestoj*); ke oni malpermesu al la oratoroj reklamon pri diversaj verkoj ke oni forlasu la longajn disputadojn; ktp... Li fine proponas, ke oni voĉdonu pri labora regularo de la Kongresoj.

S-ro Schneeberger, prezidanto, kredas, ke ne estas necese voĉdoni pri tio; li invitas S-ran Capé transdoni tiun ĉi demandon al la konstanta komitato.

S-ro Capé konsentas.

S-ro Boirac rimarkigas, ke ne urĝas decidi nun tian regularon. Oni povas montri ideojn, kiujn ekzamenos la organizaj komitatoj. Ĝis nun la prezidanto estis la vivanta regularo; la plej bona principo estas la principo de libereco. Kompreneble la prezidanto ne scias antaŭe, kion diros parolonto, kaj oni ne povas forigi malĝentile la dirojn iom reklamajn.

S-ro Sergent (franco) opinias, ke en la Kongresaj festoj oni ne devas ludi diversajn himnojn naciajn krom la himno de la lando, kiu akceptas la kongreson. La esperanta himno « *La Espero* » tute sufiĉas.

S-ro Capé diras, ke li faris sian proponon pri regularo nur por altiri la atenton de la kongreso al tiu ĉi temo.

S-ro Aymonier (franco) poste stariĝas, kaj parolas pri la novaj vortoj en la diversnaciaj vortlibroj.

La esperanta vortaro ne estas ankoraŭ finita, li diras, ĝi eĉ ne estos iam finita. Esperanto ĉiutage pliriĝas kaj konstante pliriĝos. Pro tio, ĉiu nova eldono de la esperantaj vortlibroj donas novajn vortojn. Ĉu do ni devas aĉeti ĉiujn eldonojn de ĉiuj diversnaciaj vortlibroj por koni la plenan vortaron de Esperanto?

En la vortlibro Esperanta-Germana, ekzemple, estas multaj novaj aprobitaj vortoj, kies traduko ne estas trovebla en la francaj vortlibroj, kaj, se germano uzos ilin en ia verko, neniu franco povos ilin kompreni, se li ne aĉetos la germanan vortlibron aŭ la estontajn novajn eldonojn de la francaj vortlibroj, en kiuj eble troviĝos, fine la novaj vortoj.

Sed ĉiuj esperantistoj ne estas riĉuloj, kaj ne povas ĉiam aĉeti novajn librojn. Ĉu do la Lingva Komitato ne povus periode publikigi liston de la novaj aprobitaj vortoj kun traduko en la diversnaciaj lingvoj, kiel jam faris la gazeto *Cesky Esperantista* (sen traduko) kaj niaj anglaj amikoj (kun angla traduko) pri la novaj vortoj en la germana vortlibro?

D-ro Zamenhof diras, ke de nun li ne aprobos plu novajn vortojn.

S-ro Boirac opinias ankaŭ, ke estus tre dezirinde, ke aperu ĉiujare listo de la novaj vortoj. Sed tio ĉi estas tre malfacile efektivebla, ĉar ĉiutage aperas en tekstoj novaj vortoj, ekzemple *fono* uzita de Kabe, *rezisti* proponita de S-ro Sentis ktp... La Komitato ne povas ĉion tralegi, tamen estas certe tre dezirinde, ke aperu periode tia listo.

S-ro Cart diras, ke en Esperanto estas nur unu vortaro: la *Universala Vortaro*; ĉiuj aliaj vortoj estas nur aldono.

La demando estas resendata al la Lingva Komitato (1).

S-ro Moch legas poste leteron de S-ro Otto Simon propo-

(1) Aperos baldaŭ ĉe la Presa Esperantista Societo nova vortlibro Esperanta-Franca enhavanta ĉiujn radikojn, kiuj nun troviĝas en la diversnaciaj esperantaj vortlibroj (broŝurita 1 fr. 50; kartone bindita 2 fr.)

nantan, ke oni alprenu kiel esperanta festotago la tagon de naskiĝo de D-ro Zamenhof.

D-ro Zamenhof insiste petas, ke oni ne akceptu tiun ĉi proponon. Oni ne devas, li diras, ligi la aferon kun lia nomo; alpreni de lia naskiĝotago kiel festotago estus rekte malutila por la afero.

S-ro de Beaufront demandas, ĉu ne sufiĉas la Kongreso mem, kiu estas vera festo de la Esperantistoj.

S-ro Naumann (ruso) rimarkigas, ke estas malkompreniĝo en la diskutado: D-ro Zamenhof ne parolis kontraŭ la ideo mem de festo, sed kontraŭ la proponita dato.

D-ro Zamenhof tute aprobas la diron de S-ro de Beaufront, ke la Kongreso estas jam nun por ni festo. La forestontoj povos festi hejme ĝian daton.

S-ro Boirac diras, ke la Kongreso ne povas aprobi tiun diron, ke, se oni ligus la aferon kun la nomo de D-ro Zamenhof, tio estus malutila. (*Aplaŭdoj.*)

S-ro Naumann pensas, ke oni povus elekti krome alian festotagon por skui la mondon.

S-ro Kuchler (germano) proponas, ke oni festu la malfermon de la Kongreso.

S-ro de Beaufront opinias, ke oni povas konservi la kongreson kiel festo. La forestontoj povos festi unu el la tagoj de la Kongreso.

S-ro Deshays (franco) pensas, ke la forestontoj ne povos festi hejme la Kongreson.

S-ro Hanauer (germano) proponas la tagon, en kiu oni alkondukis la plej multajn anojn.

S-ro Schneeberger, prezidanto, demandas la Kongreson ĉu oni volas festan tagon.

Laŭ konsilo de S-ro Boirac, oni ne faras nun decidon ĉar la demando ŝajnas ankoraŭ nematura.

S-ro Kühnl (bohemo) rimarkigas, ke, cetere, ĉiu grupo povas mem elekti taŭgan tagon.

Post tiu ĉi diskutado ne restas sufiĉe da tempo por aŭskulti anoncitan komunikajon de S-oj Maréchal kaj Hanauer pri metodo de instruado por Esperanto.

S-ro Courtet (franco) esprimas la deziron, ke D-ro Zamenhof donu kelkajn ekzemplojn de bona prononco de Esperanto.

D-ro Zamenhof respondas, ke tio ĉi estas jam farita en Boulogne kaj ŝajnas al li senutila hodiaŭ, ĉar li konstatis, ke oni jam faris grandajn progresojn de unu jaro (1).

S-ro Moch proponas poste, ke la Kongreso esprimu dankon al la diversaj komitatoj kaj societoj, kiuj helpis al la sukceso de la Kongreso, kaj aparte al la gazetaro kiu tre simpatie kaj detale raportis pri ĝiaj laboroj (*Aplaŭdoj*).

S-ro Moscheles (anglo) diras sin tre feliĉa, ke la tria Kongreso okazos en Anglujo ; al la kongresanoj li diras : « Ĝis la revido ! »

S-ro de Beaufront tiam supreniras la estradon.

« Karaj amikoj, li diras, mi ne parolos longe, ĉar vi estas lacaĵ, kaj mi estas lacega.

« Hieraŭ, en la posttagmezo, laŭ lia deziro kaj mia, mi vizitis sur la monto Salève la eminentan S-ron Naville, unu el la vivantaj gloroj de l'belega lando, kiu nin akceptas tiel kore, tiel amike.

« Mi portis al li la saluton de nia Majstro, la saluton de l'Kongresa komitato, la saluton de vi ĉiuj kun la mia.

« Li ripetis al mi sian intereson por nia entrepreno, sian admiron por la verko de nia kara Majstro, sian simpatian por ni ĉiuj.

« Fine, komisiinte al mi sian saluton por la Kongreso, li diris, ĉe la momento de mia foriro : « Nun ni interkisu nin frate ! », kaj li kisis min dufoje.

« Ĉar mi ne povas konservi por mi sola tiun ĉi duoblan kison, mi tre respekte petas nian karan Majstron permesi, ke mi transdonu ĝin al li, kaj per li al la tuta Esperantistaro... »

Tiam D-ro Zamenhof kaj S-ro de Beaufront kore kisas

(1) La progresoj faritaj estas efektive tre grandaj. Tamen estus ankoraŭ dezirinde, ke kelkaj francoj pli zorge atentu pri la ĝusta loko de la tonika akcento sur la antaŭlasta, kaj ne sur la lasta silabo : *Tio ĉi estas tre grava*. Kelkaj angloj devus atenti ankaŭ, ke en Esperanto la sono de la vokaloj estas pura kaj simpla, kaj ke o, ekzemple, ne estas *aoŭ*. Fine al kelkaj germanoj oni povus rekomendi atenton pri konsonantoj kiel s kaj z, d kaj t, kiujn ili ofte interŝanĝas en la vortoj, dirante ekzemple *kunzido, konzulejo, zet*, anstataŭ *kunsido, konsulejo* kaj *sed*.

unu la alian kaj restas kelkajn momentojn brusto ĉe brusto en varma ĉirkaŭpreno.

Kia estas tiam la entuziasmo de la kongresanoj, mi eĉ ne provas esprimi. Per tondra aplaŭdado kaj laŭtaj krioj « *Vivu Zamenhof!*... *Vivu de Beaufront!*... » ili longe aklamas en komuna ovacio la kreinton de Esperanto kun la unua franca pioniro, al kies longa kaj obstina penado ni ŝuldas la nunan belegan disvolviĝon de l'Esperantismo.

Post kiam silento iom post iom refariĝis, S-ro Moch legas raportetojn komunikitajn pri la privataj kunvenoj de la kuracistoj, scienculoj, ktp. ;

S-ro Chavet donas informojn pri ekskurso en Annecy, kiu okazos morgaŭ ;

S-ro Privat legas kelkajn leterojn kaj donas sciigojn pri la solena fermo de l'Kongreso kaj pri la morgaŭaj diservoj.

Fine, la prezidanto, S-ro Schneeberger, fermas tiun ĉi lastan laborkunsidon, dankante la kongresanojn, kaj invitante ilin veni tre multope hodiaŭ vespere en la *Victoria Hall* ; kie okazos la solena fermo de l'Kongreso kaj esperanta parolado de Majoro Lemaire, kun lumaj projekcioj, pri la belga Kongo.

(*Aplaŭdado, krioj : Vivu Schneeberger !*)

La kunsido finiĝas je la kvina kaj dudek minutoj.

*

* *

Dum la posttagmezo, antaŭ kaj post la labora kunsido, diversaj specialistoj ekkaptas la liberajn momentojn por fari ankoraŭ kelkajn privatajn kunsidojn. Inter aliaj, kunvenas la muzikistoj, la diversreligiaj pastroj por priparoli neŭtralan temon, la ŝakludistoj, kiuj fondas specialan societon, la socialistoj kaj liberecanoj, la pacifistoj kunvokitaj de S-ro Moch.

*

* *

Vespere, je la oka kaj duono, en la *Victoria Hall*, solena fermo de la Kongreso. Parolado en Esperanto (kun lumaj projekcioj) de S-ro Majoro Lemaire pri la Belga Kongo.

Tiu ĉi lasta kunveno de la Kongreso okazas; kiel la malferma, en la luksa vasta koncertoĉambro *Victoria Hall*. Kiel en la unua, la ĝeneva publiko estas senpage invitita per afiŝoj; ĝi tute plenigas la galeriojn ne okupitajn de la kongresanoj.

Dum orgeno ludas, D-ro Zamenhof eniras sur la estradon, sekvata de la membroj de la diversaj komitatoj kaj de la naciaj delegitoj. Li estas salutata de longa varma akklamado. Post kiam ĉesis la aplaŭdoj, li sidiĝas kun dekstre generalo Sébert, S-roj Boirac kaj Privat; maldekstre S-ro Schneeberger, F-ino Schafer kaj kolonelo Pollen.

S-ro Schneeberger, prezidanto de la Kongreso, parolas unue.

Ni nun estas, li diras, je la fino de nia Kongreso. Cio en ĝi pasis en paco por la bono de nia bona afero. Ni havis multe da okazoj por interparoladi amike kaj gaje. Ni montris, ke arta lingvo taŭgas por interrilatoj inter diversnaciaj homoj. La laboraj kunsidoj montris, ke ekzistas granda fervoro por servi la lingvon mem kaj ĝian disvastiĝadon. La decidoj faritaj estas tre gravaj. En Boulogne oni fiksis la netuŝeblecon de la lingvo; en la nuna Kongreso oni difinis ĝian neŭtralecon pri ĉiuj religiaj politikaj kaj socialaj aferoj. La afero eliras nun, el propaganda stato: venis ja en la Kongreson diversaj specialistoj, kiuj uzis la lingvon por sciencaj kaj aliaj praktikaj celoj. Do, la Kongreso atingis sian celon kaj plenumis grandan laboron por la estonteco. Espereble, tio efike helpos por la propagando en Svisujo, kaj baldaŭ venos tempo sen skeptikuloj.

La parolanto esprimas denove dankon por la bona akcepto en Genève; li dankas ankaŭ la bravegan anaron, kiu alvenis el ĉiuj landoj; kaj, en la nomo de la Svisa Esperantista Societo, la internacian organizan komitaton, kiu tiel efike helpis en la propagando kaj en la organizado de la Kongreso.

Kaj nun, li diras post lasta danko al D-ro Zamenhof, ni disiru en niajn landojn, kaj post kelktaga ripozo ni rekomencu denove nian propagandan laboron!

Dum la aplaŭdoj post tiu ĉi paroladeto, kvar svisinoj, en nacia kostumo, alportas al nia Majstro belegan kronon el laŭraj branĉetoj kun montaj floroj kaj ruĝ-blanka rubando — koloroj de Svisujo — sur kiu brilas per oraj literoj la jenaj vortoj: « *Al la glora Majstro D-ro Zamenhof, la Svisaj Samideanoj* ».

La aklamoj kaj aplaŭdoj tiam atingas la plej altan paroksismon, dum la majesta kaj potenca voĉo de l'orgeno triumfe miksiĝas kun la senfinaj krioj : *Vivu Zamenhof !* en vere nera-kontebbla emocianta sceno.

S-ro Paul Loyson, juna poeto, nove varbita Esperantisto, deklamas poste belegan francan odon dediĉitan al D-ro Zamenhof kaj inspiritan de la plej altaj kaj noblaj sentoj.

S-ro Schneeberger dankas la poeton por la entuziasmigaj versoj, kiujn li verkis kaj tiel kore deklamis.

Poste, S-ro Moch legas la diversajn dezirojn esprimitajn en la kunsidoj de la Kongreso, pri kiuj mi jam detale raportis : aprobon de la proponoj esprimitaj en la raporto de la organiza komitato, akcepton de la principo de fondo de esperantistaj konsulejoj, ktp.

Li poste esprimas la dankon de l'Kongreso al la diversaj helpintaj gazetoj kaj al la francaj fervojaj kompanioj, kiuj faciligis per rabato la vojaĝon al la Kongreso. Li citas aparte la nomon de S-ro Noblemaire, direktoro de la Kompanio P.L.M., kiu estas ankaŭ esperantisto.

Post S-ro Moch parolas kolonelo Pollen (anglo) en nomo de ĉiuj fremdaj samideanoj.

Li dankas unue pro la honoro farita al la Angloj per la elekto de Anglujo kiel sidejo de la venonta Kongreso. Li poste admonas insiste — en Esperanto — la neesperantistajn ĉeestantojn, ke ili fariĝu Esperantistoj. « Lernu, lernu, lernu nian lingvon, li krias al la ĝeneva publiko ; mi pensas ke jam vi komprenas min bone... »

Li diras sin ne inda laŭdi D-ro Zamenhof, kiu cetere ne deziras tion : li ne deziras esti nomata Majstro, sed amiko. Oni povas nomi lin homo, homo en la bona senco de l'vorto ; ni neniam vidos similan al li !

Li dankas la svisajn amikojn — kaj precipe la junan amikon, kiu posedas saĝecon de maljunulo, S-ron Privat, kiu laboris nokte kaj tage por nia... komforto. Li dankas, ke la svisaj samideanoj tiel amike akceptis la Kongreson en ilia belega lando, en la lando de beleco, de libereco. Ili sukcesis, li diras, dank'al la virinoj : Oni ne povas havi ĝardenon sen

poleno, nek sukceson sen virinoj (*rido*j). Al ĉiuj longan vivon kaj tre feliĉajn tagojn !

Li fine petas pardonon pro sia nelerteco en parolado : **Mi** havus rajton, li diras, paroli dufoje, ĉar mi estas Irlandano. Oni diras, ke la Angloj povus meti, parolante, la piedojn en la buŝon... Vi devas esti feliĉaj, ke mi ne faris tion hodiaŭ vespere !... (*Ridoj kaj longa aplaŭdado.*)

Post tiu ĉi gajhumora paroladeto dirita kun plej ĝaja mieno, kaj ofte interrompita de ridoj kaj aplaŭdoj, fine stariĝas kaj ekparolas D-ro Zamenhof.

Li sentas grandan emocion ; tial li parolos tre malbone kaj mallonge. Li dankas, ke oni venis de tiel diversaj landoj por labori en la Kongreso. Li dankas por la amo montrita al li, kiu estas nur la standardo de la ideo. Li esperas, ke ĉiuj restos fidelaj al la standardo, kaj ke, disirinte en siajn landojn, ili ĉie semos la esperantan semon. Li esperas, ke, en la venonta jaro, en Anglujo, oni denove kunvenos kun tia sama entuziasmo kiel en Genève, ke oni tie ricevos ankoraŭ pli da fruktoj kaj estos en multe pli granda nombro.

« Nun, li fine diras, la laboroj de la Kongreso finiĝis, kaj mi anoncas, ke la dua Kongreso Esperantista estas fermita. »

Ciuj kongresanoj tiam stariĝas kaj longe aplaŭdas tiun ĉi lastan paroladeton de D-ro Zamenhof ; la orgeno ekludas « *La Espero* », kaj ĉiuj ĝin hore ekkantas en majesta malrapida takto, laŭ la muzikaĵo de S^o de Ménil malavare disdonita de *La Revuo* al ĉiuj kongresanoj. Granda, neforgesebla sceno, vere triumfa apoteozo de nia glora Majstro !

Poste komenciĝas la parolado de Majoro Lemaire pri centra Afriko, kun belegaj lumaj projekcioj. Kvankam eble iom longa por lacaj kongresanoj, ĝi tamen tre interesas ĉiujn aŭskultantojn, kiujn ĝi agrable instruas pri kuriozaj Afrikaĵoj, sed precipe ĝi pravas unu fojon plie al la ĉeestantaj profanuloj la mirindan taŭgecon de Esperanto por trakti eĉ tre specialajn kaj sciencajn temojn.

Kiam finiĝis la parolado, D-ro Leono Zamenhof laste deklamas al la nun disirontaj kongresanoj la sekvantan adiaŭan poezion, kies tekston li afable bonvolis poste transskribi mem sur mian notkajeron por la legantoj de *Lingvo Internacia* :

La lastaj eksonis jam horoj
Kaj nia finiĝis festeno;
Kun novaj impresoj en koroj
Ni nunan forlasas kunvenon.

Sur unu fandinte altaro
La sentojn kaj kunajn esperojn,
Ni freŝan fervoron al faro
Kaj novajn forportos fajrerojn.

Hieraŭ ankoraŭ fremduloj,
Hodiaŭ ni estas frataro ;
Ekfalu nun antaŭ okuloj
Nin longe barinta remparo.

Finigis kondamno miljara,
Homaro distrita sur mondo
Denove fariĝas fratara
Parence ligita homrondo.

Sed post la praava eraro
Ni pli eĉ ne celos ĉielon,
Ni restos sur ter' amikaro
Por novan eviti Babelon.

Nun ĉiuj ni iru laŭ lando
Kun flama en koroj fervoro,
Kaj mondon de l'rando ĝis rando
Ni veku per nia laboro !

Kaj kiam forkuros la jaro,
Ni jam en aregoj pli grandaj
Al nova alflugos altaro
Levita de l'fratoj Anglandaj !

*

* *

Dimanĉon, 2-an de Septembro. — La Kongreso estas nun oficiale finita ; tamen hodiaŭ okazis ankoraŭ du gravaj notindaj faktoj, nome du esperantaj diservoj, unu katolika kaj alia protestanta.

En la preĝejo Saint-François, pastro Guinart (hispano) faris meson por la katolikaj kongresanoj. Dum tiu ĉi meso, en kiu ĉeestis granda nombro da diversnaciaj esperantistoj eĉ ne-katolikaj, pastro Peltier (franco) predikis en Esperanto, kun permeso de la ekleziaj estroj, aludante interalie la Apostolan Benon senditan de Lia Papa Moŝto al la gazeto *Espero Katolika*. Antaŭ kaj post la prediko esperantaj himnoj estis kantataj de S-ino Guivy kaj F-ino Perrin.

En la templo de l'« *Auditoire* » okazis samtempe la unua protestanta diservo en Esperanto. En ĝi pastro Schneeberger (sviso) legis la rakonton pri la Babela konfuziĝo de l'lingvoj, kaj pastro Rust (anglo) faris esperantan predikon. Dum la diservo tri religiaj kantoj estis kantataj de la ĉeestantoj, kiuj estis proksimume ducent kvindek.

Oni memoras, ke jam en Boulogne estis farata meso speciale por la kongresanoj, sed pastro Peltier tiam ne ricevis permeson prediki en Esperanto. En Genève okazis do la du unuaj predikoj en lingvo internacia.

Hodiaŭ okazis ankaŭ kunveno de la « *Ruĝuloj* », kiuj decidis fondon de *Socia Revuo*.

*

* *

London, 3-an de Septembro kaj la du postajn tagojn okazis belega ekskurso tra la plej pitoreskaj lokoj de Svisujo. Pri ĝi mi ne povas raporti tie ĉi detale, ĉar vere mi jam tro longe tedadis miajn kompatindajn legantojn. — Ili pardonu min ! —

Gi estis por la feliĉaj 250 partoprenantoj bonega okazo por daŭrigi ankoraŭ kelkatempe la ĝojan kunestadon kaj babiladon kun la samideanoj. Sed, bedaŭrinde, forpasas rapidege tri tagoj en tiel bela lando, kun tiel bonaj amikoj !

Post reveturo Genevon, afabla invito de generalo Sébert vespere kunigis lastan fojon la lastajn kongresanojn en la kiosko de l'« Bastionoj ». Ĝis malfrue en la nokto ili tie ankorau babiladis amike tiom pri la laboroj kaj la esperataj efikoj de la ĵusa kongreso, kiom ankaŭ pri projektoj por la estonta ; kaj, kiam fine alvenis la senkompata neprokrastebla horo de l'adiaŭoj, aŭdiĝis sur ĉies lipoj dum la lastaj koraj manpremoj tiuj ĉi solaj esperplenaj vortoj :

Ĝis revido... en Anglujo !...

TEDULO.



Tiu ĉi raporto estas kunigita en unu libreto, kies venda prezo estas 75 centimoj.

La raporto verkita de S-ro FRUICIER pri la unua Kongreso en Boulogne estas ankaŭ eldonita sub formo de broŝuro aĉetebla por 50 centimoj.

Oni turnu sin al la *Preso Esperantista Societo*.

Malkaraj Afiŝoj Internaciaj por Propagando. — La Grupo de Versailles ĵus eldonis propagandajn afiŝojn (en formo de 62 × 21 cm. banderoloj) redaktitajn **nur** en Esperanto.

La vorto « **ESPERANTO** » per grandaj literoj altiras de malproksime la rigardon. Sub ĝi estas presita la konata frazo : « *Simpla, fleksebla, belsona, vere internacia en siaj elementoj, la lingvo Esperanto prezentas, k. t. p...* » tre taŭga por montri specimenon facile kompreneblan de nia lingvo.

Tiuj afiŝoj estas certe bonegaj propagandiloj, kaj tre taŭgos por vekti intereson al Esperanto, aŭ ĝin periode reveki, precipe antaŭ anonco de parolado aŭ malfermo de kurso.

50 ekzempleroj, 1 fr. ; a frankite 1 fr. 25;

100 — — 1 fr. 75; — 2 fr. 20.

Sendu mendojn al S-ro **PIERRE CORRET**, sekretario de l'Grupo, 12, rue de Vergennes, *Versailles* (Seine-et-Oise), Francujo.

Monoflerado por la blinduloj

Dum la Kongreso de Genevo : Post la lasta kunveno : 296,00 — Anonimo 1003,05 — Post parolado en Morges 10 — Vendado de libroj 40,20 — Sumo 1349,25.

Antaŭ la Kongreso : S-ro Rigoir (En Songô) 6,50 — F-ino Marg. Jones 12,50.

Post la Kongreso : Post parolado en Neuchâtel. 10 fr. — S-ro Sabadell 4,05.

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

Administrantaro : **Th. Cart**, prezidanto ; **Paul Fruictier**, delegito ;

Pro Benoit, D^{ro} Vallienne, membroj.

Sekretario de l'adm. : **V. Chaussegros**. — Teknika direktoro : **Lengyel Pál**.

VORTAREGO

FRANCO-ESPERANTA

kunlabore redaktata de diverslandaj esperantistoj, sub kontrolo de « Lingvo Internacia » kaj de « L'Espérantiste »

Prezo : 17 frankoj. — Prospekton senpage.

La tuta verko enhavas proksimume 80 kajerojn da 16 paĝoj ! — Unu kajero da 16 p. vendita aparte : 50 centimoj, aŭfranke 55 c.

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, rue Lacépède, PARIS



ADRESARO DE KOMERCISTOJ

akceptantaj uzadon de Esperanto.

AVIZO. — La unua enpresado estas senpage ; ĉiu nova enpresado kosta 50 centimojn, deĉdu presoj = 5 frankojn ; por niaj abonantoj : 12 presoj 2 frankojn.

Paris, 33, rue Lacépède, — *Preso Esperantista Societo*, entreprenas la faradon de ĉiuspecaj presaĵoj.

Glasgow, 137, West Regent Street, — *Tabaka Sindikato Esperantista*. — Specialaĵo : « CIGAREDO ESPERANTO ». — Telegrafa adreso « Verdastelo, Glasgow ».

Barcelono (Hispanujo), Puerta-Ferrisa, 30. — *Johano Rosals*, librovendisto. Vendado de Esperantaj verkoj. Specialaĵo en libroj kaj utilaĵoj por lernejoj.

Valence d'Agen (France), — *Alfred Gérin*, posedanto de vinberejoj. Bonaj vinoj familiaj naturaj. Prezaro kaj specimenoj aŭfrankite laŭ peto.

Hódság (Bács-megye), Hungarujo, — S-ro *Molnár Gyula*, deziras interŝanĝi kolektojn da papilioj kun loĝantoj de tropikaj landoj ; interŝanĝas ankaŭ elŝtopitajn (remburitajn) birdojn.

Paris, IV-e, 17, rue du Temple, — *Fernand Blangarin*, reprezentanto por vinoj. Bonegaj vinoj el Bordeaux, Beaune, Madeira, Malaga, O Porto. — Rumoj. — Peti prezaron kaj specimenojn. — Forta rabato por Esperantistoj.

LA INTERNACIA TRINKAJO !

Viskio Esperanto

Registered trade mark

N° 270,042

Marque déposée

N° 13,195

Registered label N° 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **Esperanto** sur la afiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

BUCHANAN, SCOTT & Co

Garthland street,

GLASGOW (Skotlando).

ADELBODEN, Berna Oberlando, 1350 m. s. m.

— S V I S U J O —

Plej bela kaj sunplena vintra stacio.

Ĉiuj sportoj per skioj, glitŝuoj, glitiloj

☆☆ Internacia Apoteko Th. HOPF, ☆☆

ESPER. KONSILANTO

aŭtoro de la ilustrita gvidlibreto en Esperanto

« TRA BERNA OBERLANDO »

aĉetebla ĉe

OSCAR HOPF en THUN

Svisa Esperanta Eldonejo.

KRISTNASKO

MUZIKVERKO

Poezio de TH. GAUTIER. Esperantigita de D^{ro} PHILIPPET.

Muziko de L. RIGOIR.

Prezo 1 fr. 50 c. — Ricevebla ĉe la

Preso Esperantista Societo

33, rue Lacépède, — PARIS.

Preso Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

